



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Novembro 2008

3. évfolyam 39. szám

NOVEMBRO	3
La jaro 2008	3
Popola fabelo pri reĝo Matiaso	9
Kion vi scias pri d-ro Ferenc Jáki?	10
Ĉe statuo de Sándor Kőrösi Csoma	11
PAŬLANOJ EN DIÓSGYŐR	12
Mia „Patro nia”	14
MIA „PATRO NIA”	16
Saĝaj diroj	16
Anoncoj en Esperanto	17
Testamentoj de Ada Csiszár	17
HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO	18
Demando kaj propono	24
Miŝkolcaj okazintaĵoj	29
Rakontoj pri reĝo Matiaso	30
Jubileo	30
Rusta folio	30

NOVEMBRO

Karaj niaj legantoj!

Nun, rigardante la proksimiĝantan jarfinon, ni komencas la repensadon pri la finitaj aferoj dum la jaro, kaj pri la forrestintaj. Tiel ni rememoris la neraportadon pri multaj, ĉi jaraj, de ni festitaj eventoj krom Jaro de la Tero, la Lingvoj, kaj la Rato. Ja, ni povas mencii ankaŭ pri.

La jaro 2008

Ne estas nur la 550-a datreveno de kronigo de nia reĝo Matiaso, sed ankaŭ Jaro de la Renesanco en Hungario

En Italio, dum la turniĝo de la 13-14. jarcentoj komenciĝis la disiĝo de la mezepokaj sociaj rilatoj.

Italio estis la tiama plej civitaniĝata teritorio de Eŭropo. Ĝiaj riĉaj komercisturboj atingis la staton de memstareco, jam dum la 13-a jarcento. En Italio la memoraĵoj de la antikva epoko apartenis al la ĉiutaga vivo. Pro la favoraj kondiĉoj tie disvolviĝis la plej frue la nova idea influo, la *humanismo*; malkovranta la idealon de la burĝona klaso kaj la verkojn de la antikvaepokaj verkistoj. Kaj tie naskiĝis la nova arto; la *renesanco*, klopode revivigi la antikvan epokon.

La humanismo floris en Italio en la 14-16-a jarcentoj, poste disvastiĝis en tuta Eŭropo. Unue ĝi havis literaturan koncernon. Ĝi turniĝis kontraŭ la asketismo anoncita de la katolika religio, kaj ideo ĝi estis la antaŭkuriero de la reformacio. Ĝi komenciĝis kiel kultura movado por renovigi la kulturalan-sciencan kaj filozofian heredaĵon de antikva Greklando kaj Romo, anoncis la liberecon de homo, la mondkoncepton de la homa digno, kaj la sintenon baziĝantan sur ĝi.

La humanistoj estis homoj vast-horizontaj, multflankaj, bone orientiĝitaj en scienco literaturo, lingvistiko de la erao. En Italio dum la 14-15-a jarcento la plej gravaj kompetentuloj estis: Petrarca, Boccaccio. La interrilatoj komenciĝis inter hungaroj kaj la italaj humanistoj jam dum la regno de Anjou-reĝoj, per dinastiaj interrilatoj, kiuj antaŭpreparis la elformiĝon de la Renesanco en Hungario. En Hungarlando la plej grandaj humanistoj, artoprotektantoj estis: Vitéz János, Janus Pannonius, Bornemissza Péter, Szánoki Gergely krom la italaj Galeotto Marzio kaj Bonfini.

La renesanco ekiris el Firenze. La renesanca Arta stilo en Florenco elformiĝis inter proprecaj ekonomiaj, politikaj, kulturaj rilatoj, ĉ. 1420. La bankista familio Medici de Florenco havis disvastiĝintajn financajn rilatojn ankaŭ kun la hungaroj, ja ili ricevis iu plej grandan parton el la hungarlanda kuproelminado. Per ilia grandioza havaĵo elleviĝis ĝia familiano Cosimo, kiu estis reganto de Florenco ĝis sia morto en 1434. La grandegan familian bibliotekon kreitan de li, „La Biblioteka Laurentana” evoluis alia familiano Lorenzo (1449-1492) vere granda.

Ankaŭ li mem estis poeto, li igis la urbon al kolektiĝejo de la siaepokaj grandaj sciencistoj kaj artistoj. Sed ne nur ili havis elstaran efikon pri la plibeligo de Florenco, kaj levo de sia lumo, ankaŭ la aliaj riĉaj patriciaj familioj diligente dungis la arkitektojn, skulptistojn, ĉar la sentomondo, pensmanierio de ĉi tiuj homoj jam disiĝis de la gotiko, en siaj verkoj ili ĉerpis el la klasika pasinto kaj pere de propra genio kreis majstroverkojn ĝis nun. Tiuj estas ekzemple la: Kapelo de Pazzi, Palaco Pitti, Palacoj-Medici-Riccardi, Palaco-Strozzi. Grandsignifa estis la roloj de Filippo Brunelleschi, Rafaello, Michelanĝelo. Ili malkovris la belecojn de la mondo kaj lerte redonis en siaj verkoj la riĉan variecon de la belecoj. En Italio verkis la frurenasanca artisto Dante Alighieri. Li estis la unua verkisto, kiu korpigis la renesancan spiritecon. Parton de lia verko (el la La Divida Komedio) el la itala, esperantigis d-ro Kolomano Kalocsay, kaj

ĝi (La tradukita verkoparto titolita: INFERO) troveblas en la F A J S Z I ESPERANTO-KOLEKTAĴO - ĉe n-ro 4063 - en la Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto. La renesanco atingis sian pinton dum regado de la familio Medici. Poste ĝi rapide disvastiĝis en la tuta Italio. La fino de la Renesanco estis majo de 1527, kiam la hispan-germanaj armeoj kuratakis kaj derabis Romon. La plej gravaj historiaj eventoj de la jarcentoj de la renesanco estis: la senĉesa lukto kontraŭ la teritori-konkerantaj Turkoj, kaj unu la plej granda malvenko: Forfalo de Bizanco en 1453! Dum la 16-a jarcento, ankaŭ granda parto de Hungario suferis turkan okupon, kaj dume la trans-danubo landparto restis en mano de la regantfamilio Habsburg,

Tiuj-ĉi eventoj influis la vivon de la landoj de Eŭropo.

En tiun epokon naskiĝis

Mátyás Hunyadi.

La hungara reĝo Mátyás Hunyadi (Matiaso Hunjadi) naskiĝis en Kolozsvár (Koloĵvar, kiu nun nomiĝas Cluj kaj apartenas al Rumanio), la 23-an de februaro 1443.

Li mortis en Vieno la 6-an de aprilo en 1490.

Lia patro Johano Hunyadi reganto, grandsignifa kontraŭturk-batalanto estis. Inter ceteraj al nomo de la patro ligiĝas la granda venko kontraŭturka, en 1456, en Nándorfehérvár (Nun la loko nomiĝas Beogrado, en Serbio). Tiun-ĉi venkon eternigas bela murpentraĵo de la Palaco-hotelo de Miškolc-Lillafüred. Je memoro de tiu venko sonoras la sonorilejoj de Eŭropo dum ĉiu-tagmeze. (Tio estas eble nur hungara legendo, la ordono de tiama papo devenas de pli frue. – Jen noto de la revizianto.)

Lia patrino Erzsébet Szilágyi, estis same nobeldevena.

Nian reĝon Matiason oni nomas: Mátyás Corvin, la justa reĝo Mátyás, oficiale: Mátyás la I-a, sed la publiko nomas simple: - Mátyás király – reĝo Matiaso. Lia nomo estas hungare Hunyadi Mátyás, latine kaj germane: Mathias Corvinus. En sia subskribo rolas: Mathias rex. Li regis en Hungario inter 1458 kaj 1490.

De 1469 li estis ĉeĥa kontraŭ reĝo, de 1486 „Princo de Aŭstrio”. La hungara tradicio opinias lin, kiel unu plej grandan hungaran reĝon, kies memoron gardas multe da popolfabelo, legendo.

Lia blazonbesto estis la korvo, tial estis li nomata Corvinus (Korva). El liaj samepokaj reprezentantoj la plej fama estas la reliefo de Lautzen (1486), kies kopio rigardeblas en fortikaĵparto de Buda sur la placo Hess András. Lia rajdanto-statuo en Kolozsvár, estas kreaĵo de hungara skulptoartisto Johano Fadrusz (1848-1903).



Matiason, la pli junan filon de Johano Hunyadi, ĝis la 6-a jaro edukis sia vartistino kaj sia patrino, poste instruistoj inspektadis lin. Johano Vitéz (kaj la grandaj humanistoj) montris al li la imperion de la konoj. Kaj, ĉar ili la humanistoj estis larĝhorizontaj, multflankaj, siaepokajn sciojn, literaruron, lingvojn konaj homoj, ili edukis Matiason multflanka, interesiĝanta homo. Ili instruis al li: eklezian- kaj ŝtatjuron, kaj latinon inter multaj aliaj lingvoj. Rezulto de tiu ĉi maniero estis, ke dum lia reĝado li povis paroli sen interpretisto kun ĉiu lingvulo, kiu petis de li aŭdiencon.

Johano Vitéz – edukisto de Matiaso, kiel episkopo de Várad kaj ĉefepiskopo de Esztergom – donis en manojn de Matiaso la verkojn de la antikva epokaj kaj tio de la plej famaj humanistoj de la tiama Eŭropo. Ekzemple de Petrarca kaj Boccaccio. Johano Vitéz estis ne nur subtenanto, mecenanto, sed ankaŭ li mem estis agema verkisto – individuo de la humanista erudicio. De preposto László Karai li invitigis por veni en Buda, la italan tipografon Andreon Hess, kaj de tio sekvis la komenciĝo de la tipografado en Hungario, de 1473. Ties dato estas 1473. Kaj la unua libro estis la *Chronika Hungarorum*, *Kronikode Hungararo*. Pli poste biblioteko de Johano Vitéz konkursis kun tio de Matiaso. La renesanc-ornamaj kodeksoj de Johano Vitéz ankoraŭ estis enportitaj el Italio, sed la pliaj bibliofilaj pretiĝis jam en la reĝa metiejo en Buda. Ties kelkaj ekzempleroj ankaŭ konatas. Grava paŝo de la ĉefepiskopo estis krome, en 1467 la fondo de universitato en Pozsony (Poĵonj, nun Bratislava en Slovakio). Bedaŭrinde, la Accademia Istropolitana ne restis ĝis hodiaŭ. Johano Vitéz je lia vivofino kontraŭturniĝis al politiko de Matiaso. La ribelon de ĉefnobeluloj Matiaso subpremis, la estron Johanon Vitéz arestigis, sed ne ekzekutigis. Johano Vitéz mortis en sia 64-a jaro, gardita en sia domo. Lian spiritan lumon obskuris de tio de Matiaso. Al tiu aludas la titolo de ekspozicio aranĝita en marto 2008 en la Biblioteko Széchenyi en Budapeŝto: „Stelo en ombro de La Korvo”.

Inter la du filoj de Johano Hunyadi, la pli aĝa filo László havis la ŝancon – kiel filo de la plej multhava bienulo, armeestro de la lando – por reĝiĝi fine. Sed pro pakto inter Ladislao Habsburg V-a kaj la unu kontraŭ batalantaj ĉefnobeluloj, sorto de László iĝis la ekzekuto. Pri tiu temas la hungara opero Hunyadi László de nia muzikverkisto Ferenc Erkel.

Post morto de la pli maljuna filo de Hunyadi, en la lando estiĝis maltrankviliĝo.

Reĝo Ladislao la kvina kiel ostaĝon portis kun si Matiason, unue en Vienon, poste en Pragon. Sed kiam la reĝo prepariĝante al sia geedziĝo, neatendite mortis inter ne klaraj cirkonstancoj, al la trono malfermiĝis la ŝanco de Matiaso Hunyadi. Matiason helpis estiĝi reganto, la partianoj de la patro Johano Hunyadi, devenantaj el vicoj de la meznobelularo, kontraŭ la ĉefnobelaj – baronaj ligoj. Matiason oni elektis reĝo, la 24-an de januaro en 1458.

En 1459 li debatis el la lando la atakantan germanan imperiestron Frederikon II-an, kiun la Garay-ligo invitis enveni por rompi la potencon de Matiaso.

En 1461, en Buda edziĝis Matiaso kun Katarina Podjebrad. Dum 1462-1463 li reakiris la tronon de Frederiko III-a per la „Kontrakto de Bécsújhely”. En ties esenco li pagis 80000 orajn forintojn pro la krono. Johano Vitéz kronis lin per la krono, la 29-an de marto 1464, en Székesfehérvár.

Krome, en la kontrakto ili deklaris kiel komunan celon: la batalon kontraŭ la turkaj konkerantoj. Plue ili deklaris: se Matiaso mortos sen filo-posteulo, la hungaran tronon heredos Mikŝa la filo de Frederiko III-a. Poste tiu escepto iĝis la jura bazo de la Habsburg dinastia potenco pretendo. Tiutempe okazis liaj denovaj militiroj: en Vlahio (Rumenio), poste li venkis la turkojn apud Temesvár, kaj pli poste li sieĝis fortikaĵon de Jajca. Tiutempe mortis la unua edzino katarina Podjebrad, kaj ankaŭ la posteulo de Matiaso, pro puerpera febro.

En 1471 kontraŭ la potenco de Matiaso eksplodis ĉefnobela ribelo, estrita de la malkontenta ĉefepiskopo Johano Vitéz. Oni invitis al la hungara trono la polan reĝon Kazimiron.

En 1475, post okupo de Boroszló, Matiaso kontraktis per elstara taktiko kun la reĝoj ĉeha kaj pola. Matiaso – per lia 10000 soldata armeo – rebatis la 40000 membran polan armeon atakantan la landon, poste forpelis ilin de la lando kaj malliberigis Johanon Vitéz. Lian grandanimecon, saĝecon montras, ke lian iaman edukiston li ne ekzekutis. Li tenis tiun en ties domon kaj ne permesis lin forlasi la landon.

Graveco de lia elstara politiko estis, Graveco de lia elstara politiko estis, estigo de diplomataj kontaktoj kun multaj landoj. (Ekzemple li kontaktis ankaŭ kun grandregnestro de Moskvo: Ivan la kvara en 1482.)

Kvankam li neniam vizitis Italion, tamen bone parolis itale. Li ĝuis la artojn. Gravajn kontaktojn li havis kun italaj regantoj kaj kun pli multo de la kolektantoj- skribis pri li lia biografioskribanto Bonfini. En 1476 denove kontraŭturka batalo. Okupis la setlejon Szabács.

En Buda (reĝa rezidejo) 1476, li edziĝis kun Beatrica de Aragonio, reĝidino de Napolo. Posteulo ne devenis el ilia geedziĝo. Sed la reĝa paro altiris en ilian kortegon, elstarajn individuojn de la renesanca-konstru- kaj prelegarto. Multaj bonfamaj scienculo, naturobservanto vizitis ilin. Ekzemple Callimachus, Bonfini, Galeotto Marzio... kaj ĝuis lian patronadon ankaŭ multaj hungaraj humanistaj verkistoj. Inter la lastaj pleje elstaris Janus Pannonius. Kvankam li verkis latine, tamen... li estis la unua granda lirikisto de hungaroj.

En 1477 Matiaso denove batalis kontraŭ la germana imperio. Li atingis, ke la imperiestro rekonis lin kiel ĉehan reĝon sed ankaŭ li rekonis la ĉeh-reĝan titolon de reĝo Vladislao (Ulaslo).

Per apogoj de urboj organiziĝantaj al klaso kaj la etnobelaro reĝo Matiaso faris paŝojn (por stabiligi kaj plukonstrui la centran potencon) al la stabiligo kaj plukonstruo de la centra potenco, inter la kadroj de la klasaj reprezentantaj formoj de la feŭdala ŝtato. Li pliaktivigis ekzemple la rolojn de la kancelario, la fiskejo, la juĝejo de persona ĉeesto – oficoj. Sed ĉiam kaj ĉie li klopodis justan aferaranĝon de la per impostoj ŝarĝita popolo. Multfoje maskvestita li vagadis tra la lando, por propraokule konvinkiĝi pri la justaj aferaranĝadoj – raportis pri tiuj agoj Bonfini; lia biografioverkisto. Reĝo Matiaso estris sukcesajn militirojn, li sukcese disvastigis sian regadon al la konkeritaj teritorioj. La tiel nomita „Nigra armeo” donis la kernon de la soldularmeo, kiu partoprenis en multaj venkhavaj bataloj. Gravan rolon ludis en siaj sukcesoj la moderna, ankaŭ por atako taŭga infanterio, kaj la artilerio. Kvankam plimulto de soldataro konsistis el pezkirasaj rajdantoj, ankaŭ tiuj batalis laŭ la malnova, elmodiĝinta maniero, sed kunakordigite per la pluraj armilspecioj laŭ la tiamaj principoj. En la armeo ricevis gravan rolon ankaŭ la facilmovaj husararo. Post morto de Matiaso, la Nigra Armeo ne ricevis sian soldon, demoraligis, ties restaĵojn disbatis Paŭlo Kinizsi armeoestro.

La konstantajn konstruadojn, militirojn, la subtenon de lia armeo, faris ebla la financa politiko de reĝo Matiaso. Estis fakto, ke li plimultigis la ŝtatan enspezon per tre pena ŝarĝo de la impostpagantoj; unuavice de la servutuloj. Lia poŝara enspezo ne forrestis de la tia de reganto de Francio. La repremo de la feŭdala anarĥio favoris kaj al evoluo de la urbindustrioj, la produktado de varoj. Plialtiĝis la ekonomia signifo de la kampurboj, tiel ankaŭ la enfluantaj impostoj plimultiĝis..

Lia po-jara elspezo unu miliono da forintoj kovris la elspezojn kaj de la grandiozaj konstruadoj kaj tio de luksa reĝa vivmaniero.

En 1479 li venkis denove super la turkaj armeoj en Kenyérmező (nun en Rumanio).

Lian naturan filon Johanon Corvin (Johano Korvin 1473-1504) estante 6 jara, li nomumis al „Princo de Liptó”, poste „Grafo de Hunyad”. El la dua geedziĝo ne havante laŭleĝan posteulon Matiaso Hunyadi, li nomumis tia Johanon Corvinus.

En 1483 por kvin jaroj Matiaso packontraktis kun sultano Bajazid. Dum 1485a li okupis Vienon kaj li pritraktis kun imperiestro Mikŝa. Matiaso prenis la titolon „Princo de Aŭstrio”. **Nia reĝo Matiaso neatendite, mortis la 6-an de aprilo en 1490 en Vieno. Li estis entombigita en Székesfehérvár.**

Post morto de reĝo Matiaso, la reĝino Beatrica kontraŭstaris, ke la ĉefnobelaj ligoj rekonu Johanon Corvin, kiel posteulon.

Fine **Johano Corvin** rekonis anstataŭ li elektitan ĉehan reĝon Vladislaon (Jagello Ulaslon) kaj Johano Corvin kontentis por havi pri la titoloj:” Reĝo de Bosnio”, „Princeco de Slavonio”, Regionestro de Kroatio,-Dalmatio.” Johano Corvin havante tiujn, rezignis pri la hungara trono, dum 1500-1502 sukceshave rebatis la turkajn atakojn. Li mortis en 1504.

Memoron de Matiaso Hunyadi, gardas: skulptaĝgrupo en lia naskiĝejo Kolozsvár, (nun en la rumania Cluj), en Hungario Budapeŝto sur la placo Hess András unu figura statuo, kaj sur la placo de herooj samurbe, unu skulptaĝo: ĉeval-rajdanto.

Oni povas konstati, ke en Hungario la Renesanco komenciĝis jam dum reĝado de reĝo Sigmundo, sed floris dum reĝado de Matiaso I-a. Post li la renesanco komencis regresi.

La mondfamajn kodeksojn de reĝo Matiaso, pentris libroartistoj de Florenco. La konstruon de la fortikaĵpalaco de *Buda*, direktis itala majstro. Same italaj majstroj skulptis la belegan marmorputon kaj skulptaĝojn kaj la pupan barilon de lia palaco en *Visegrád*.

La renesancepokajn palacojn, fortikaĵojn, nobeldomojn, preĝejojn detruis la Turkoj, Germanoj. Tamen la modelstokon de la hungaria renesanco eĉ iom ŝanĝigite, sed transprenis kaj konservis la popola konstruon, kiu aplikis la ogivon kaj volbarkon. Tiuj estas videblaj sur la iamaj nordhungariaj – kaj transilvaniaj burĝondomoj kaj kasteloj. Poste aperis la plej karakteriza specialiĝo de la renesanca arkitekturo; la orname prilaborita punta-kornicar. Enkonstruo de renesancaj elementoj estas konstateblaj en la pli malfrue konstruitaj enkonstruaĵoj. Tia estas ekzemple en la mezepokaj fortikaĵoj de Sárospatak (Nordhungario) enkonstruita pupfigura, kolona loĝio, la t.n. „ *Aleo de Perényi* (konstruita de familio Perenji)”. Renesancajn stilelementojn konservas ankaŭ la *Palaco-hotelo en Miŝkolco-Lillafüred*.



La aleo Perényi de fortikaĵo en Sárospatak



2, La Palaco-hotelo en Miŝkolco-Lillafüred

Oni rememoris pri Jaro de Renesanco, en preskaŭ ĉiu loko de nia regiono norda Hungario. Ni nun rememoros ne pri Miŝkolco, sed ni parolos pri programoj de nia alia granda industria urbo Ózd. Pri nia setlejo, havante la nomon Ózd, mi skribis lokhistorion ankaŭ esperantlingve jam pli frue, kaj ĝin vi trovos sur la turisma retpaĝo de HEA: www.hungario.hu

Nun mi povas diri, ke Ózd okupis vere elstaran lokon en vico de la organizadoj kaj disvolvadoj de la aranĝoj rememorantaj al la Renesanco. La aranĝoj de marto ĝis fino de aŭgusto okupiĝis pri konigo de erao de reĝo Matiaso kaj la Renesanco. La organizantoj/ la Urbeŝtaro de Ózd, La Tradiciogardanta Asocio (Budapeŝto), La Biblioteko de Ózd, kaj ankaŭ la aliaj organizantoj eminentan laboron finis per vasta skala prezento de la grava epoko: helpe de prezentoj subĉielaj, teatraj, porinfanaj luddomaj, kaj per la plej diversaj prelegoj, koncertoj, belartaj ekspozicioj. El inter ili kelkajn mi mencias malsupre:

Grandan sukceson rikoltis la:programserio Renesancaj Amuzadoj. Menciinde el inter tiuj; la batalprovoj – kaj ludoj, la kiras- kaj armilekspozicio, la Matiasepoka ceremonio de proklamo kavaliron, Renesancaj dancoj...

El la programserio: Rakontas la Renesanco: Renesancepokaj anekdotoj, pikantaj historioj...

BIBLIOTECHA CORVINIANA (Biblioteko Korvina): Kamera ekspozicio de Biblioteko de reĝo Matiaso.

Heredaĵo de reĝo Matiaso: kulturhistoria „kiu-kion scias” konkurso.

La homamason allogada : maska marŝado, /dum kiu la rolantoj marŝis laŭ Matiasepokaj frizaĵoj, vestaĵoj kun armiloj,/ estis tre plaĉema kaj poste la kuiristoj kuiris kaj servis la matiasepokajn manĝaĵojn al la por gustumi scivolema popolo.

La Husar- kaj Rajdanta Banderio de Ózd, povis brile prezenti sian rajdanto-scion antaŭ la gapmiranta publiko.

(Laŭ hungarlingva informo de s-rino Mariann Csörnök-el Urbeŝtaro de Ózd)





La fotojn sendis Mariann Csörnök el Ózd, kaj tiuj devenas de la Fondaĵo por gardi la Historiajn Tradiciojn (Budapeŝto (<http://www.maretemporis.hu>))

Ni deziras, ke direktantoj de kleriga vivo de urbo Ózd, kreu ankoraŭ multe da same grandiozaj aranĝaĵoj. Al ilia plia laboro, multe da sukceso deziras nome de la miŝkolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”:

Laŭ la ricevitaĵoj de Mariann Csörnök el Ózd, verkis kaj tradukis: s-rino Adrienne Pásztor

Popola fabelo pri reĝo Matiaso

La juna kaj la maljuna juĝisto

Mi jam eĉ ne memoras kie estis, kie ne estis, eble eventis en la vilaĝo Naserĉu, kie juĝis kaj aranĝis la aferojn de la vilaĝo tre juna vilaĝestro. Sed kiel li plenumis siajn taskojn, vi povas informiĝi pri tio en ĉi tiu fabelo.

Tiutempe reĝo Matiaso, kiel li kutimis fari, vojaĝis en la lando kune kun sia eskortaro, kaj tiel li aranĝis la aferojn de la lando. Foje li preterveturis la vilaĝon Naserĉu, kaj venis al li en kapon viziti la vilaĝon, se ili jam veturas en la ĉirkaŭaĵo. Li volis ekzameni kiel antaŭeniras la aferoj ĉi tie, kiel plenumas sian taskon la tiea vilaĝestro.

Nu, la reĝoj kaj la kortaj sinjoroj trovis en la vilaĝo teruran malordon: la kampaulaj kortoj ne havis barilojn, de la domoj, kiuj bruliĝis kaj detruigiĝis en la pasintaj jaroj oni ankoraŭ ne forigis la flugcindron kaj la ruinaĵojn, tra la stratoj vagadis kaj mordbatalis hundoj, la najbarinoj tiel laŭte disputis, ke oni ne povis aŭdi la kriaĉadon de ebruloj, kiuj grumblante ŝanceliĝis tra la tuta vilaĝo.

Ekkriis reĝo Matiaso:

– Kie estas la vilaĝestro, venu tuj antaŭ min!

Antaŭen venis la vilaĝestro. La reĝo, vidas, ke li estas tiel juna, ke favore indus li esti dando, ol vilaĝestro.

Demandas lin Matiaso:

– Kiel okazis, ke vi estiĝis vilaĝestro tiel june?

Nu, tiam la vilaĝanoj raportis al la reĝo, ke ili havis maljunan vilaĝestron, sed ĉi tiu junulaĉo estas la plej granda masrto en la vilaĝo Nekeresd, kaj li forigis la maljunulon el la ofico de vilaĝestro, kaj li metis sin mem anstataŭ lin.

– Aŭskultu, mia frateto – diris reĝo Matiaso –, ne meritas ja, junulaĉo la vilaĝestrecon!

Sed la junulo rektigis sin, kaj fiervoĉe respondis al la reĝo:

– Mi tamen meritas ĝin, majesta reĝo, ĉar mi estas pli saĝa ol tiu maljuna.

Nu, ni konvinkiĝos kiom saĝecon vi havas. Mi ordonas, ke morgaŭ matenon ĉi tien, antaŭ la preĝejon starigu tridek lupojn, kvardek saĝulojn kaj sesdek frenezulojn. Mi estos ĉi tie matenon, kaj se vi ne plenumos mian ordonon, vi estos puŝata de via ofico.

Reĝo Matiaso forveturis promenante kun la sinjoroj, sed matenon li fakte revenis.

Antaŭ la preĝejo amasiĝis la tuta vilaĝanaro, sed vidiĝis nek tridek lupoj, nek kvardek saĝuloj kaj nek sesdek frenezuloj. Sole la juna vilaĝestro staris tie kun tremantaj genuoj antaŭ la popolo.

– Oj nu, kara mia frateto vilaĝestro! Kie estas viaj tridek lupoj, kvardek saĝuloj kaj sesdek frenezuloj?

Fajroruĝiĝis la vangoj de la juna estro. Li eĉ respondi ne povis, nur terenĵetiĝis antaŭ la reĝan ĉaron, kaj petadis por kompato, indulgo.

Sed, jen rigardu! En sama momento aperis la maljuna eksvilaĝestro de malantaŭ la preĝejo, kaj post li en bela ordo tridek lupoj, kvardek saĝuloj kaj sesdek frenezuloj.

– Mi estas ĉi tie – majesta Reĝo – kun tridek lupoj, kvardek saĝuloj kaj sesdek frenezuloj, kiel vi ordonis.

Kaj li klarigis tiel al la reĝo kaj al la sinjoroj, dirante:

– Ili ĉi tie, miaj tridek junuloj estas tridek jaraj, ili estas fortaj, kiel la lupoj. La kvardek homoj estas kvardek jaraj, ili estas saĝuloj, ĉar en tiu aĝo oni jam saĝiĝas. Kaj ĉi tiuj sesdek homoj estas malsaĝuloj, ĉar kiu en tiu aĝo ankoraŭ restas malriĉa, tiu estas frenezulo.

– Vere, ĉi tiu estas la respondo, kiun mi atendis! Ekde hodiaŭ estos denove vi la vilaĝestro! Kaj vi, mia frateto, vi povas lerni, por la ofico de vilaĝestro pli bona taŭgas maljunulo ol junulo.

Esperantigis Sándor Horváth - Lábatlan



Kion vi scias pri d-ro Ferenc Jáki?

Ĉu vi scias, ke Ferenc Jáki naskiĝis la 16-an de novembro 1919 en Érd-Ófalu? Li komencis viziti gimnazion en Székesfehérvár, en 1930. Post la abiturienta ekzameno li studis pri filozofio kaj teologio en Zirc. Li doktoriĝis en Budapeŝto en la Filozofia Fakultato de la

Pázmány Péter Scienca Universitato de Budapeŝto, poste li akiris mezlernejan instruistan diplomon en hungara kaj latina lingvoj. Lia instruisto en Esperanto estis Julio Baghy.

Ekde 1962 instruas Esperanton D-ro Ferenc Jáki. Li estas rekonata poeto per siaj hungare kaj esperantlingve verkitaj poemoj. Li arte tradukas ankaŭ hungarajn- poemojn kaj popolkantojn. (Laŭ la biografio aperinta en la poemvolumo *Kantante Vivi*)

Al nia onklo Feri, okaze de lia naskiĝtago: elkore deziras bonan sanon kaj multe da ĝojo..la membraro de la miŝkolca Esperanto-amika Rondo „Király Lajos”.

Nun, ni komunikas lian belan poemon:

Adri Pásztor

Ferenc Jáki

Ĉe statuo de Sándor Kőrösi Csoma

En krudaj ŝuoj, kvazaŭ li ĵus nun komencus iri,
al Oriento serĉante spurojn de prahungaroj.
Trovis li pezajn, ne imageblajn provojn survoje:
morbo, malsato, frosto, varmego, sovaĝ-rabisto,
stulta, orgojla oficisteto bremsis la vojon.
Li ne timtrema: iras obstine, iras piede,
por ke li trovu pralingvon, landon de hungaro.
En monaĥej' de morna Tibeto: sola „lamao”
kolektas vortojn, faras tibetan-anglan vortaron
kaj gramatikon. Ĝojas la anglo kaj Eŭropo.
Estas en libro de la hungaro lingva trezoro.
Kaj kism sentas li, ke la celo estas proksime,
kontraŭ kruela sorto de l' fato vane li luktas,
pro murda febro, murda malsano li tre laciĝas:
mortas senhejme en monaĥejo nia migranto...
Granda heroo kaj idealo de posteuloj,
brila dekorado de Hungario: vivu en koroj!

(Érd)

(Ferenc Jáki/Marianna Legányi: *Ĝenelve élni/Kantante Vivi* – Szolnok- 2006)



KÖRÖSI CSOMA SÁNDOR

PAŬLANOJ EN DIÓSGYŐR

Ili konstruis la unuan monaĥejon antaŭ la jaro 1240, komence de la konvertado al romkatolika kristana religio. Ĝiaj loĝantoj estis ermitaj monaĥoj, dum la tempo de la batalo ĉe Muhi, la 11-an de aprilo 1241 ili fuĝis antaŭ la tataroj en sian filian domon en Szentlélek kaj de tie ne revenis.

Post eliro de la tataroj Ákos Ernye, iu el la savintoj de la vivo de reĝo Adalberto 4-a translokiĝis kun sia grandnombra familio en la forlasitan, el ŝtono konstruitan klostron, kiel soldata komandanto, banuso de la ĉirkaŭantaj setlejoj. Por iliaj idoj certigis hejmon ĉ. dum 70 jaroj la klostra konstruaĵo, la familia noveldomo – supozeble per pliampleksigoj. De tie direktis banuso Ernye la konstruon de la ŝtonfortikaĵo, kiun post lia morto lia filo palatino Stefano daŭrigis. Kiam la fortikaĵo pretiĝis, kie liaj gepatroj kaj anoj de la grandnombra familio estis entombigitaj – laŭ la tiamaj kutimoj –, li loĝigis monaĥojn por gardi kaj prizorgi la lokon dum jarcentoj. Li elektis paŭlanajn monaĥojn, ĉar el inter la tiamaj ok monaĥordenoj nur ĉi tiu estis hungara, kiun fondis en 1263 Özséb, ĉefepiskopo de Esztergom. La ĉefepiskopo donacis por la vivteno de la monaĥoj bienon, la Feltő-fiŝlagon, vinberon produktantan montoflankon kaj muelejon. Ilian kultivadon, prizorgadon faris familioj loĝiĝintaj apud la monaĥejo .

La monaĥoj faris animzorgadon de la de la loĝantaro en preĝejo de la klostro, de tempo al tempo servis en la fortikaĵkapelo kaj aranĝis la direktadon de la mastrumado.

La romkatolika eklezia ceremonio laŭgrade ĉesis dum la tempo de la fortiĝo de la reformacio, pro tio la paŭlanoj en 1570 foriris al Sajólád, sed siajn bienojn ludonis dum 140 jaroj. La 14-an de majo 1737 denove fondiĝis la romkatolika eklezio kaj en 1739 la paŭlanoj reloĝiĝis. Siajn konstruaĵojn ili renovigis, pliampleksigis, en la orienta fino de la longa tunelo sub la Barát-monto faris du volbitajn vinkelojn. Dum la regado de reĝo Jozefo la 2-a oni ĉesigis la

monaĥordenojn, iliajn havaĵojn alŝtatigis. Tio okazis en Felsőgyőr/Felšődjör la 20-an de marto 1786. Tiutempe la ordeno havis sep anojn. Vilaĝon Felsőgyőr oni aneksis al Diósgyőr la 1-an de januaro 1887. La artmonumentajn klostrajn konstruaĵojn uzas ekde la jaro 2000 la Forstinspektorejo. Ĝi troviĝas en Miskolc, str. Árpád nr. 90.

La kromnomo de la memstara vilaĝeto Felsőgyőr estas estas Majláth ekde la mezo de la 18a jarcento. Ĝia plej malnova konstruaĵo estas la en bona stato konservita monaĥejo. La esperantlingva traduko (tradukita el la hungara versio) de ĝia latinteksta memortabulo estas:

JE PLEJ GRANDA GLORO DE DIO FONDIS LA MONAĤEJON, NOMITAN PRI LA SANKTA KORPO DE LA ORDENO DE ERMITA SANKTA PAŬLO EN DIÓSGYŐR EN 1313 PALATINO STEFANO BORSODI DUM LA TEMPO DE REĜO ROBERTO KARLO.

PLI MALFRUE ĜI RICEVIS DONACAJN DE LA HUNGARAJ REĜOJ REGANTAJ PRO LA FAVORO DE DIO : LUDOVIKO, MARIA, SIGISMONDO.

SED EN JARO 1526 GASPARO ŜERÉDY DETRUIS ĜIN PER SAKRILEGIAJ MANOJ.

LA FAVORKORA IMPERiestro kaj TRIUMFA HUNGARA REĜO KARLO LA 3-A ,
REKONSTRUIGIS ĜIN EN 1739.

(La hungarlingvan historion de la Paŭlana Monaĥejo, ricevitan de la Restoracio Pálos de Diósgyőr, esperantigis: László Pásztor)





Jen la nuntempe videblaj konstruaĵoj kaj ruinoj de la eksa monaĥejo de Paŭlanoj en Diósgyőr

La bildojn fotis: László kaj Adrienne Pásztor

Papp, Lajos

Mia „Patro nia”

Kiam via koro jam triste troplenas,
Kiam vin viziti jam nenio venas,
Kiam vian vivon nigra nuboj kovras,
Kiam la amatoj pri vi ne plu zorgas,
Ho „animo”, neniel malesperu,
Supren rigardu, obstine esperu,
Preĝante: * /PATRO NIA, KIU ESTAS EN LA ĈIELOJ!/*

Kiam vi sentas vin sola en la mondo,
Al demandoj viaj ne venas respondo,
Kiam ĉirkaŭas vin aĉa vort-inundo,
Blasfemas la Malbon’ Dion kiel hundo,
Ho „animo”, ne lasu vin trompi,
Supren rigardu, por la sorĉon rompi:
Sinjor’, */SANKTIĜU VIA NOMO!/*

Kiam la Malbono regas jam la Teron,
Kaj la mensogaro subpremas la Veron,
-- Kiam eĉ tutglobe estiĝas Infero,
Kaj la homojn signas Kaina fajra fero,
Ho „animo”, ne laciĝu, ne kapitulacu;
Supren rigardu, al lumo eterna,
Kaj petu: Sinjor’, */VENU REGNO VIA!/*

Kiam vin turmentas la morna realo,
Kiam malaperas ĉiu idealo,
Kiam vi suferas pro nervoza febro,

Kiam amikeco iĝas nur funebro,
Ho „animo”, ne kolapsu, ne amariĝu!
Supren rigardu, al la nub'tavolo,
Kaj diru: Sinjor'! */ESTIĜU VIA VOLO!/*

Kiam malriĉuloj sparadas monerojn,
Kiam vi konstatas altiĝi la prezojn,
Kiam la riĉuloj havas milionon,
Dum la malriĉuloj eĉ ne la milonon,
Ho „animo”, gardu la koran kuraĝon,
Supren rigardu, preĝ-movu la manon,
Kaj petu: Sinjor'! */DONU NIAN ĈIUTAGAN PANON!/*

Kiam pri la vivo vi jam tro-laciĝas,
Kiam via kredo jam forvaporigias,
Kiam preĝi mankas kaj emo kaj forto,
Kiam Lin nei altrudiĝas vorto,
Ho „anim”, vin gardu! Nepre ne konsentu!
Supren rigardu, al Dio vin donu:
Sinjor', helpu! */KAJ MIAJN PEKOJN PARDONU!/*

Kiam vi kredis esti estimota,
Kaj ankaŭ loĝejo estis ricevota,
Ĉio via tasko estis plenumita,
Sed nun vi jam scias esti fi-uzita,
Ho „animo”! Ne koleru, ne malfidu:
Supren rigardu, al Dio vi konfidu:
Sinjor'! */MI PARDONAS AL LA KONTRAŬ MI PEKINTOJ!/*

Kiam grandpotencoj pri paco parolas,
Sed fakte -- mortigi, pereigi volas,
Kiam ili ĉion klopodas konkeri,
Kiel tion, Patro, vi povas toleri?!
Ho „animo”! ne ribelu, ne frustriĝu;
Supren rigardu, kaj faru atenton:
Sinjor'! */NE KONDUKU NIN EN TENTON,
SED LIBERIGU NIN DE LA MALBONO,
AMEN!/*

EPILOGO

*

Kaj tiam ekparolas la Majstro, severe sed milde:
For, Satano! Ĉesu ĉiu vento!
*Estu PACO kaj SILENTO!/**

Kial vi timas, etfiduloj?
FIDU! Ja mi promesis al vi,
Ke la infero ne povas vin venki!
Ho, fidela grego, jen mi, la Pastoro,

Kiu restos kun vi, ĝis la lasta horo

(Tradukis el la hungara E. Dudich, 5 julio 2008/ Ĉi teksto estas originala teksto de la traduko, la liaj estas malaj - A.P)

MIA „PATRO NIA”

Karaj niaj gelegantoj!

Pri aŭtoro de ĉi bela poemo aperinta rete, sur la reto legeblas pli da informoj. Ne nur unu homo konfesas sin ĝia aŭtoro. Bedaŭrinde, kontraŭ niaj provoj, ni povis atingi nek unu verkanton el inter ili. Ni scias nek tion, kiu estas de la vera aŭtoro, de kiu ni ricevis la malsupran permeson por komuniki la belan poemon.

De la retadreso Ballán Mária lambert@tvn.hu alvenis la sekva letero:

„Estimata Pásztor Lászlóné!

Mi dankas vian noton en mian blogon” (<http://www.propeller.hu/kultura/175859-dr-papp-lajos-szivsebesz-az-en-miatyankom>) „kaj ĝoje permesas aperigi la poemon.

Estimplene: Ballán Mária”

Ni opinias, ke ĉi poemo - ekde sia ekapero sur la reto – apartenas al trezoroj de literaturo de la hungararo kaj per ties esperanto lingva traduko, ankaŭ tiu de ĉiuj esperantolingvon komprenantulo.

Nome de (la hungaraj kaj alilandaj) legantoj:

ESTU BENATA

al lia/ŝia tuta vivo: la aŭtoro de la poemo MIA PATRO NIA! -

Havu la aŭtoro multe da ĝojo kaj bona sano!

Deziras, kaj la permeson sendantan hungarlingvan leteron esperantigis

Adrienne Pásztor

Saĝaj diroj

Afableco

Estu ĉiam iomete pli afabla, ol necese.

Fiereco

La fiereco instigas nin ĝuste agi, sed nur kun amo ni aga perfekte.

(El „Aro de saĝecoj”, kolektaĵo de d-ro Endre Dudich)

Anoncoj en Esperanto

„Julio 2009 - En Milano la 82a SAT-Kongreso

Okazos en Milano ek de la 18a ĝis la 25a de julio 2009 la 82a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), Asocio naskiĝinta en la jaro 1921 pro merito de esperantistoj maldekstruloj laŭ diversaj tendencoj politikaj kaj kulturaj, kiuj per esperanto donis spuron de egaleca komunikado al internaciaj rilatoj kaj valorigis esperanton kiel lingvo por kultura kresko por tiaj tavoloj de la popolo kiuj ne havas ilojn kaj eblecojn.

Temo de la kongreso: Emigri senlime, vivi sennaciece

Ĉiuj informoj kaj ĝisdatigoj estos en la retpaĝo:

<http://sat.arciesperanto.itinta>

Andrea Montagner Prezidanto OKK

Itala Esperanto-Federacio - [<fei@esperanto.it>](mailto:fei@esperanto.it)

Itala Esperantista Junularo - [<iej@esperanto.it>](mailto:iej@esperanto.it)

via Villorosi, 38 I-20143 Milano - Tel+fax +39 02 58100857

<http://www.esperanto.it>

Kontribuojn sendu al: f.amerio@libero.it

Kompilanto: Francesco Amerio [<f.amerio@libero.it>](mailto:f.amerio@libero.it)

INFORMITALE 132

Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

ESPERANTO-VOJAĜOJ TRA POLLANDO 2009 lige kun 18 IEK kaj 94 UK

Se tiujn vi ŝatus plie scii, bonvolu turni vin al andreo@rubikon.net.pl aŭ al

esperanto-turismo@wp.pl

Testamentoj de Ada Csiszár

„Doktoro Árpád MÁTHÉ informis min, ke:

Ada CSISZÁR, kiu postlasis du testamentojn, en la dua testamento "surpaperigis, ke cxiujn esperantajxojn, troveblajn en sxia logxejo heredu IEMW, (Internacia Esperanto Muzeo en Vieno) krome ankaux la eldonrajtojn de Kálmán Kalocsay kaj Ada Csiszár.

- László Szilvási –KEA – esp-en-hung listo”

„Institucio Hodler 40-jarigxis

La julia-auxgusta numero de "Esperanto" en 1968 raportis pri plano de la Estraro de UEA lanxi kampanjon por "fortikigi la financon bazon de la Asocio". La artikolo emfazis: "Ne ekzistas en la mondo kulturaj organizajtoj, laborantaj sen iu ajn subvencio, kiuj povas funkcii sen defecitoj nur per siaj membrokotizoj. Iliaj manoj estas ligitaj pro konstanta monmanko. Prosperas nur tiuj, kiuj trovis aliajn fontojn de enspezoj."

La kampanjo celis kolekti kapitalon, kies rento liveru al UEA ekstrajn rimedojn aldone al kotizoj. Rezulte, la 28-an de oktobro estis starigita fondajxo, kies oficiala nomo farigxis Institucio Hodler '68. Gxi ricevis propran juran personecon en Nederlando, kun estraro nomumata de la Estraro de UEA. Ekde la komenco gxi kolektis donacojn kaj pruntojn sen rento aux kun malalta rento. La unua estraro konsistis el E.L.M. Wensing (prezidanto), Maurice Jaumotte kaj Evert J. Woessink, kiuj membris ankaux en la Estraro de UEA. Marianne Vermaas, kiu samjare rezignis kiel Direktoro de la Centra Oficejo, farigxis la unua administranto.

La nuna prezidanto de la Institucio estas Grégoire Maertens, kiu eniris la estraron unuafoje en 1970 kaj estas prezidanto ekde 1986. En la estraro membras krome Ans Bakker-ten Hagen, Renato Corsetti, Ivo Durwael kaj Ilja De Coster, kaj la administranto estas Pasquale Zapelli. La cxefa havajxo de Institucio Hodler estas domo en Antverpeno, kiu estis akirita en 1980 kaj kiun luas Flandra Esperanto-Ligo kaj la Antverpena Esperanto-klubo "La Verda Stelo". Cxi-jare la Institucio aljugxis subvenciojn je la suma valoro de 9200 euxroj. La plej grandan subtenon, 5000 euxrojn, ricevis Fondajxo Canuto. Projektoj ekster UEA ricevis 1700 euxrojn.

Kiu deziras prunti aux donaci monon al Institucio Hodler, bonvolu kontakti la Centran Oficejon por pli detalaj informoj.

- laux gazetara komuniko de UEA, 2008-10-29

Fonto: Ret-Info:

<http://www.eventoj.hu>”

László Pásztor

HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO

- Parto IX-a -

Rekomenco post nova paŭzo - Ne estas permesate lasi perdi la jam kreitajn valorojn

La Miŝkolcaj geedzoj Pásztor komencis interesiĝi: kie estas la miŝkolcaj esperantistoj? Ili tiel informiĝis pri tio, ke la Nordhungaria Esperanto-Asocio ĉesis en 2003. Ili interesiĝis pri esperantistoj ankaŭ en aliaj departementaj komunumoj. La rezulto estis malesperiga.

Ili decidis, ne forgesi tiujn valorojn, kiujn la prauloj estigis. Ili tiel sentis, ke oni devas serĉi la iamajn, ankoraŭ vivantajn anojn kaj devas organizadi plu. Al tio donis helpon samideanino Ada Csíszár, kiu proponis, ke iu de la geedzoj Pásztor estu ano de UEa kaj ili ambaŭ estu anoj

de HEA. Nome nuntempe en Miskolc ne estas HEA-ano. Al fondo de iu amika rondo ŝi proponis kiel helpulon, Johanon Orosz.

Tiel fondiĝis en Miskolc la 5-an de majo 2005 la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo, kies fondantaj membroj estas:

-Adrienne Földi, s-rino Pásztor

-S-ro Ladislao Pásztor

-Suzana Gerő s-rino Parkánszki

-Helena, s-rino Fedor

-s-ro Jozefo Dudás

-s-ro Johano Orosz

- Ildikó Király, s-ino d-ro Vú

Ili konsentis pri tio, ke la amika rondo ne estu registrita societo kaj ne estu membrokotizo. La eventualajn kostojn la membroj pagas komune. Nomo de la amika rondo estu:

„Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo.

Oficoj ne estu, ja la anoj estas amikoj unu de la alia. Anoj de la amika rondo ne deziras esti anoj de HEA, volas esti sendependaj. Iliaj celoj estas la subaj:

- jardatrevenaj florkronadoj de la Esperanto-memorlokoj;
- unufoje en monato duhora amika parolado esperantlingve dum la unua merkredo de la monato inter horoj 17-19.
- ekzerciĝo en la esperantlingva parolado.

Pli malfrue la celoj plimultiĝis. La geedzoj Pásztor spertis tion, vizitante en Junio 2005 la D-ro Kalocsay-memorĉambron en urbo Abaújszántó, ke ekde ĝia ekesto oni ne ofte vizitis ĝin. Tio donis la novan celon: konigo de memorlokoj de niaj pli malvastaj regionoj por en- kaj eksterlandanoj.

La „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo estas atingebla laŭ la subaj eblecoj:

Lászlóné Pásztor, 3530. Miskolc. Strato Arany János, nro 35. IV./2.

Hejma telefono + 36 46 738 982

Poŝtelefono +36 70 570 8895

Retadreso: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

La retgazeto estas atingebla laŭ la suba retpaĝo:

<http://kiralylajos.extra.hu>

Okazintaĵoj, aranĝitaj de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo post la formiĝo en 2005

La 25-an de Aŭgusto 2005 okazis florkronado ĉe la tomboj de la nomdonanta Ludoviko Király kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy. Ĉirkaŭ la pli lasta tombo Ladislao Pásztor, instruisto ĝardeninĝeniero plantis perenojn, kontenerajn piceojn kaj aliajn ĉiamverdajn florojn.

En Septembro 2005 estis vizitado de la kunveno de la Interreta Societo de Hungaraj Artkreatoj en Tarcál. Tie multe da verkistoj kaj poetoj prezentis siajn verkojn, sed estis ankaŭ belartaj kreaĵoj. Anoj de la societo ĝojis, ke povis konatiĝi kun esperantistoj.

De Septembro 2005 Ladislao Pásztor redaktis etan gazeton. Unue tajpitan per skribmaŝino por memori pri formiĝo de la amika rondo kaj pri la en Abaújszántó ka Tarcál farita vizitado. Pli nova celo naskiĝis: zorgado de la Kalocsay-memorlokoj en Abaújszántó kune kun la miŝkolcanoj. En intereso de tiu ĉi celo komencis redakti Ladislao Pásztor kune kun sia edzino gazetorganon de la amika rondo, la „Nordhungarian Informon”, kiu aperas ĉiumonate, jam ekde novembro en cifereca formo. Pli malfrue ankaŭ la septembra kaj oktobra numeroj pretiĝis ciferece.

La gazeto okupiĝas pri okazintaĵoj de la en- kaj eksterlanda Esperanto-movado, rememoras pri jardatrevenoj, publikigas rakontojn, poemojn el la hungara kaj esperanta literaturoj kaj krome interesaĵojn kaj aktualaĵojn.

Ĝia turista rubriko prezentas vidindaĵojn de la Nordhungaria Regiono.

Ili aranĝis memorfeston en Oktobro 2005 en Abaújszántó helpe de la Urba Konsilantaro okaze de 114a jardatreveno de la naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay. Ili metis florkronojn en la Kalocsay-memorĉambro. Ankaŭ Theodor Andreas, reprezentanto de la slovakaj esperantistoj / Košice/ metis florkronon tie. Sinjoro Renato Corsetti sendis saluton de UEA helpe de reto, sed ankaŭ aliaj en- kaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj bonvenigis la iniciaton de la miŝkolcanoj. La partoprenantoj metis florojn de memorado ankaŭ ĉe la busto de d-ro Kolomano Kalocsay, ĉe memortabulo en la D-ro Kolomano Kalocsay-strateto kaj ĉe la tombo de la patrino de d-ro Kolomano Kalocsay, en la tombejo de Abaújszántó. En la tombejo dum la pietata vizitado

s-ino László Pásztor diris la „Patro nia...” komencan preĝon esperantlingve.

En la memorĉambro Zoltán Soltész, urbestro diris la festan parolon hungarlingve, poste Barnabó Batta alparolis esperantlingve. Nomo de HEA parolis d-ro Endre Dudich, vicprezidanto de HEA. La geedzoj Pásztor parolis pri la verkaro de d-ro Kolomano Kalocsay.

Ankaŭ la urba televido de Encs memoris pri la festo. Dum la festo 5 disĉiplinoj de Helena Stefano Fedor el la Miŝkolca Komlós-montopinta bazlernejo prezentis festan programon ĉe la Kalocsay-busto.

De decembro 2005 faris la revizion de la Nordhungaria Informo d-ro Emerigo Ferenczy.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA fidis pri la sukceso de la gazeto, tial en intereso de la internacia atingebleco la „Király Lajos” Esperanto-Amikan Rondon membrigis al la listo „Lokaj Esperanto-grupoj”.

Kiel eĥo efike de elformiĝo de la nova Esperanto-Amika Rondo la geedzoj-Pásztor ricevis invitadon al urbo Szolnok al la Amikeca Esperanto-Societo kaj al Budapeŝto al la de HEA aranĝita Zamenhof-festo. Ambaŭloke oni akceptis ilin volonte.

Okazintaĵoj, aranĝitaj de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo post la formiĝo en 2006.

De jaro 2006 s-ino Adrienne Pásztor estas individua membro de UEA kaj ankaŭ ano de HEA. Ankaŭ László Pásztor estas ano de HEA, ĉi tiel la amika rondo havas reprezenton ĉe ambaŭ organizaĵoj.

De Februaro 2006 pro la okulmalsano de d-ro Emeriko Ferenczy helpas d-ro Endre Dudich provizore en revizio de la „Nordhungaria Informo.”

La 1-an de Marto 2006 d-ro Endre Dudich prelegis al la miŝkolcaj esperantistoj pri la situacio de HEA.

En Marto okazis florkronado ĉe la tombo de Julio Baghy, esperantista poeto en Budapeŝto en la Fiume-strata tomboĝardeno.

En Majo de 2006 geedzoj-Pásztor partoprenis en reprezentado de HEA en Piestány en la slovakaj jubilea Esperanto-Kongreso. Poste invitaj de Magdalena Feifičová, ĉefredaktistino de Esperantisto Slovaka ili ekkonis la ĉirkaŭaĵon de Žilina kaj faris vizitadon en Esperanto-klubo de Žilina, invite de Juraj Gondžur, prezidanto de la tiea klubo.

De la 30-a de junio ĝis la 1-a de Julio 2006 geedzoj Pásztor partoprenis en urbo Tokaj en la 39a Landa Amika Renkontiĝo de la Fervojistaj Esperantistoj. Ili informiĝis de s-ino Julio Várhelyi, iama Esperanton instruanta instruistino, ke kiel sekvo de la reĝimŝanĝo ankaŭ en Tokaj ĉesis instruado de la esperanta lingvo.

En Aŭgusto 2006 la geedzoj faris vizitadon en Máriabesnyő ĉe la kriptoj de d-ro Kolomano Kalocsay, kie ili metis la florkronon de la amika rondo.

Okaze de la tago de Ludoviko, la 25-an de Aŭgusto la Amika Rondo florkronadis tombojn de Ludoviko Király kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy kaj la Miŝkolcajn Esperanto-memorlokojn.

26a de Septembro: partopreno en la Landa Fremdlingva Biblioteko ties malferman tagon, kie s-ino Helena Jozefo Böde kaj Anna Marosvölgyi organizis Esperanto-ekspozicion el esperantaĵoj de Karlo Fajsz.

Direktorino de la biblioteko metas la „Nordhungaria Informo”-n ankaŭ retroire en presita formo antaŭ la legantojn.

La 9-an de Septembro kiel invititoj la geedzoj-Pásztor ĉeestis en la ĝenerala asembleo de HEA, kie d-ro Endre Dudich rezignis pri sia vicprezidanta ofico kaj estis elektita kiel honora prezidanto de HEA. Samtempe kaj samloke estis elektita prezidanto de HEA Jozefo Baksa kaj Jozefo Eszényi vicprezidanto de HEA.

La 12-an de Septembro 2006 dum entombigo de Stefano Temesi, / 82 jaraĝa / iama eminenta fervojista esperantisto, UEA-ano, IFEF-ano ĉeestis kaj fervojistaj kaj ne fervojistaj esperantistoj de Miskolc. La funebran paroladon diris lia iama laborkunulo kaj samideano, d-ro Jozefo Halász, alte taksante la signifon de la vivo de la mortinta esperantisto.

En oktobro de 2006, la partoprenantoj festis en Abaújszántó la 115an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay, kie s-ino Adri Pásztor, alia Miŝkolca reprezentantino de UEA / unu estas d-ro Jozefo Halász / diris festan paroladon. Okaze de la festo estis florkronadoj ĉe Esperanto-memorlokoj de Abaújszántó. Ankaŭ s-ro Georgo Madár nova urbestro de Abaújszántó salutis la esperantistojn vizitantajn la urbon.

En Novembro 2006 Emeriko Cséti, fervojista esperantisto invitis la Amerikan Rondon por viziti la klubkunvenon en Debrecen, kie okazis agrabla amika interparolado.

La 16-an de Decembro: partopreno en la Budapeŝta Zamenhof-festo.

La 17-an de Decembro: ĉe la Zamenhof-strata memortabulo renovigita de la Amika Rondo okazis festo kaj florkronado. Ĉi tie László Pásztor diris festan paroladon. S-ino Adri Pásztor faris ceterajn anoncojn kaj deklamis la parafrazon „Verda lando”, kiun d-ro Endre Dudich skribis laŭ la poemo de Mikelo Babits „Nigra lando”.

Aranĝaĵoj kaj ceteraj okazintaĵoj, aranĝitaj de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo en 2007

En Januaro 2007 retroire registris „Hector Hodler” Centra Biblioteko de UEA retgazeton de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo, same kiel la Cifereca Biblioteko de la Budapeŝta

„Széchényi” Biblioteko.

En Marto 2007 okazis florkronado ĉe la tombo de Julio Baghy en la Fiumei-strata tomboĝardeno.

De Marto 2007 en Budapeŝto en la Cifereca Biblioteko de la Landa „Széchenyi” Biblioteko estas legeblaj poemaj rakontoj de Anna Fazekas, hungara verkistino,

- Kapreolido de olda onjo
- Kapreolavinjo.

Tiujn verkojn esperantigis s-ino Adri Pásztor kaj d-ro Endre Dudich.

La Miŝkolca Városgazda Publikutila Societo laŭ permeso de la Urba Konsilantaro / je la peto de geedzaj Pásztor / renovigis la du tabulojn „Esperanto-parko” / apud placo Sankta Anna / kaj la marmoran memortabulon de Esperanto, starigitan en 1957.

La 3-an de Majo 2007 Betty Chatterjee, prezidantino de la Esperanto-klubo de Kopenhago faris viziton en Miskolc, kiu helpe de geedzaj Pásztor ekkonis Lillafüred-on kaj trutbredejon de Garadna, kie post la promenado ili tagmanĝis.

En Majo de 2007 la geedzaj Pásztor ĉeestis en Martin en la Slovacia Esperanto-Kongreso, dum kiu oni festis 100an datrevenon de la Slovaka Esperanto-Movado.

En Junio 2007 Magdalena Feifíčov faris viziton en Miskolc, kiu helpe de geedzaj Pásztor ekkonis Miskolc-on kaj ties ĉirkaŭaĵon./ Ŝi helpis geedzojn Pásztor, ekkoni urbon Ŝilina, ties ĉirkaŭaĵon kaj urbon Trenĉin post la kongreso. /

La 22-an de Septembro kadre de Rikoltadaj Tagoj okazis en Abasznt rememoro okaze de 116a jardatreveno de la naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay. En ĝi ĉeestis d-ro Ludoviko Molnr, prezidanto de la Budapeŝta UMEA-fakgrupo kun sia edzino, d-ino Juliana Farkas en reprezentado de HEA, Margareta Evva, lokhistoriisto de urbo Encs kaj Lszl Szilvsi, prezidanto de KEA.

Grava okazintaĵo de la jaro estis ekspozicio de Esperanto-libroj, eldonaĵoj en la Miskolca

„Jozefo Lvay” Calvinana Gimnazio la 16-17-an de Oktobro. La ekspozicion malfermis la geedzaj Jky, kiuj estas posedantoj de la honora titolo „kavaliroj de kulturo kaj ambasadoroj de la paco”. La ekspozicion rigardis 57 personoj, sed dum la semajno post la malfermo multe da homoj estis scivolaj pri la eksponitaj esperantaĵoj. Dum la tago de la ekspozicio Stanislaw Mandrak, eksprezidanto de la Pola Esperanto-Asocio prelegis pri la Pola Esperanto-Asocio, pri la Ĉeh-metodo kaj pri la sana vivo. La prelego estis lumbilde projekciata. Al la pola gasto la geedzaj Pásztor prezentis historiajn kaj naturajn valoraĵojn de Miskolc kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

Al la 2007-a jaro ligiĝas ankaŭ unu petego sendita al la Urbeŝtraro de Miŝkolco, en kiu s-ino Lszln Psztor petis la Urbeŝtraron, ke tiu nomu publikan areon pri nia estinta TEK prezidanto d-ro Ludoviko Gyry Nagy. Je memoro de la sekvontjara (en 2008) 95-a datreveno de la ekirigo de lia unua esperantolingvoinstrua kurso, je honoro de lia kultura agado.

En 2007 nur en la Miŝkolca Komls-montosupra bazlernejo estis Esperanto-instruado fare de Helena Stefano Fedor. Ŝi instruas la esperantan lingvon ankaŭ por plenkreskuloj. Ŝi estas iu reviziantino de la „Nordhungaria Informo.”

Ankaŭ d-ro Jozefo Halász faras Esperanto-instruadon al la plenkreskuloj en la Fervojistia Kulturdomo de Miŝkolco.

Maria Busai, eksinstruistino same faras Esperanto-instruadon por plenkreskuloj.

Bedaŭrinde en ĉiuj lernejoj de BAZ-departemento ĉesis instruado de la esperanta lingvo. Ĉi ties kaŭzo estas la reĝimŝanĝo, la senintereseco kaj maljuniĝo aŭ morto de la instruistoj.

De la 31-a de Marto 2007 d-ro Endre Dudich kaj d-ro Emeriko Ferenczy jam ne daŭrigis la reviziadon de la Nordhungaria Informo pro ilia malbonstato aŭ pro alia okupiĝo. Pro tio apud Helena s-ino Fedor, Jozefo Cziboly faras la reviziadon. De tempo al tempo helpas en tiu ĉi laboro d-ro Emeriko Ferenczy kaj d-ro Andreo Dudich.

En Decembro 2007 florkronado okazis ĉe la marmora Esperanto-memortabulo el 1957 kaj ĉe la Zamenhof-strata memortabulo, okaze de la **120-jara datreveno de la naskiĝo de la Internacia lingvo-Esperanto.**

- daŭrigo sekvos -

(La hungaran tekston verkis nur de la naŭa parto László Pásztor, esperantigis László Pásztor)

Demando kaj propono

La rustobruna foliaro

Ĉu vi scias, kion fari kontraŭ la rustobruna arbaro?

- Trapentru ĝin per miniofarbo.

Verkis kaj esperantigis László Pásztor

La Dekalogo

Provonca pastro klarigas al la fideluloj:

- La Dekalogo diras, miaj fideluloj, ke ne deziru alies edzinon...

Iu liphara mastro ekstaras, tordas siajn lipharojn kaj aldiras:

- Deziras la diablo!- ja, pli ol sufiĉas al mi la mia!

(La ŝercon el la ŝercmagazino „Kacagó”esperantigis Adrienne s-rino Pásztor)



Rustobruna arbaro ĉe la setlejo Bükkszentlászló Fotis: Adrienne Pásztor

TIBOR SEKELJ

TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO

Tradukis Terezija Kapista

La titolo de la originalo TEMUDŽIN – DEČAK STEPE

-Parto III-a -

Gefianĉiĝo laŭ la stepa maniero

Enirante la jurton, la gastoj atentis ne tuŝi per kapoj la lignan kadron de pordo, ĉar tio povas alporti malfeliĉon al la hejmanoj kaj ankaŭ ne surpaŝi per piedo la altan sojlon, ĉar tio signifus krudan malĝentilecon.

Tuj post eniro la dommastro montris al Jisugej direkton ĝis la fajrejo, kie li mem prenis al si lokon apud la gasto. Temuĝin modeste eksidis sur benko maldekstre de la fajrejo. Kiel por viro lia loko certe estis en maldekstra flanko, dum la dekstra flanko de jurto ĉiam destinitas al la virinoj.

La dommastrino, enirante kun profunda riverenco salutis la gastojn. Poste komencis prepari la freŝan teon. En kaldronon ŝi verŝis akvon kaj lakton, aldonis salon kaj kelkajn pecojn da grasa ŝafviando. Nur kiam ĉio ekbolis, ŝi deŝiris pecon de verda teo, kiun la komercistoj alportas karavane el oriento, presigitan en brikformo. Intertempe ŝi eliradis enporti la hejtaĵon el seka bovfekaĵo. Dum kuirado de teo la dommastrino verŝis „kumison” el felsako, kiu estis pendigita sur la ligna skeleto de jurto, en grandetajn argilajn ujojn. La kumiso tre bongustis al Temuĝin, ĉar de hejmo ĝis nun li nenion trinkis,, krom manplenon da akvo kiam ili estis transirantaj la rivereton. Eĉ tiel freŝigita, li ne povis sekvi la interparoladon de la plenkreskuloj, kiuj ŝajnis al li senseca draŝbabilo.

- Belegas hodiaŭa tago, la suno brilas, sed sufoko forestas.
- Jes, sed mi opinias, ke post kelkaj tagoj komenciĝos la printempaj ventoj.
- Nu, ankaŭ tion ni travivos, kiel ĉiujare.

Temuĝin ekrigardis la rondan aperturon, malfermitan parton de tenda tegmento, tra kiu eliradis la fumo de fajrejo. Per rigardo li serĉas la ŝnuron kroĉitan al la ligna kadro de ronda luko. Nun la ŝnuro estis fiksita malantaŭ unu el latoj, kiuj tenas la tegmenton, sed Temuĝin rememoris kiel rapide oni eltiras la ŝnuron el ĝia kaŝejo kiam ekblovas unu el tiuj fortegaj ventoj printempaj, kiam ĉiuj familianoj per tuta sia pezo pendigiĝas sur tiun ŝnuron por malebligi al la vento forporti la jurton.

Por vespermanĝo estis servata kuirita ŝafviando kaj tiuokaze kunvenis la tuta familio. La knaboj kaj junuloj eksidis, okupante la lokojn maldekstre de la fajrejo, unu apud alia, dum la virinoj kaj knabinoj okupis siajn lokojn dekstraflanke de la fajrejo. En la fino, la plej proksime al pordo sidis knabino dek jara, kiun oni nomis Borte. Ŝi estas beleta, pure lavita kaj vestita per ruĝa „del-o”. Ŝi kondukis honteme kaj iomete rigide, ŝajne ŝi estis atingita aparte pri io.

En la tuta socio, ĝuste ŝi vekis la plej grandan intereson de Temuĝin. Verdire, li ne rigardis ŝin libere. Nur foj-foje li ĵetis supraĵe la rigardon al ŝi. Li sciis, ke ŝi estas tiu knabino, al kiu li eble edziĝos. Li ne certe sciis, kiel tio okazos kaj kian ŝanĝon tio alportos en lian vivon, nur li konsciis, ke tio signifas ion gravan. Kaj tio povas esti nur io bona, se lia patro decidas pri tio.

Dejseĉen metis antaŭ sian bofraton Jisugej grandegan pladon, plenan de kuiritaj ŝafviandaj pecoj, supre kovritan per larĝa grasa vosto de ŝafo, kio en Mongolio estas taksata kiel la plej bona frandaĵo.

Jisugej prenis akran tranĉilon kaj kiel decas al honora gasto, eltranĉadis maldikajn pecetojn el la grasa vosto kaj pecon po peco donadis al dommastro, dommastrino, ĉiuj domanoj kaj finfine al sia filo kaj al si. Dum ili manĝis la grasajn tranĉpecojn kaj la ŝafaĵon, neniu parolis. Nur la laŭta ŝmacado doni komplimenton al dommastrino, ĉar tio signifas, ke la manĝaĵo estas laŭ ĉies gusto.

Du plenkreskaj knabinoj nun alportis teleregon el porcelano kun diversaj laktaĵoj. Estis sur ĝi almenaŭ dekkvin el tiuj sepdek kvin specoj de laktoproduktoj, kiujn oni produktas en mongolaj stepoj de bovina, ĉevalina, kamelina, ŝafina kaj laktobubalina lakto. Estis tie fromaĝoj molaj kaj malmolaj, freŝaj, fumitaj, kazeoj freŝaj salaj kaj dolĉaj

. La plenkreskuloj tostis unu la alian per arhio-brando fermentita de ĉevalina lakto. Kaj laŭ la okulfermado de ĉiu gluto oni povus diri, ke ĝi bongustis al ili.

Post la vespermanĝo, kiam ankaŭ la knaboj komencis la interparoladon kaj la apudsidamto turnis sin al Temuĝin, li ne plu sentis sin ĝenata, kiel en komenco. La vespermanĝo ŝajnis al li luksa, tamen elkora. Nature, tamen tio ne okazis tiel intimece kiel hejme. Jes, jes...nun li plej volonte estus sidanta kun siaj tri pli junaj fratoj, Kasaro, Bektero kaj Belgutej kaj kun ĵusnaskiĝinta fratineto Temulin, kun kiu li volonte ludadis portante ŝin tien ka reeen. Sed de ili, li estas nun tre malproksime.

Al Temuĝin apartenis kuŝloko sur dika drapo, kiu kovras la plankon kaj li estas envolvita en ŝaffeloj.

Li longe ne povis endormiĝi. Tra la ronda tegmenta lukto li observis la tremadon de steloj en la malhela monotona ĉielo.

Vintre steloj klare brilas,

Malproksimo sonorilas,

Tiam viaj revoj cedas –

mornaj pensoj vin obsedas.

Matene, ĉe sunleviĝo, jam ĉiuj estis surpiede. Tiuj, kiuj akompanis la brutaron al paŝtejo, rapide disiris, ĉiuj al propraj devoj. La dommastrino regalas la gastojn kaj la dommastron per freŝa teo.

Post la matenmanĝo Jisugej ekstaris, rektiĝis kaj el la larĝa zono elprenis arte prilaboritan ponardon sur la polmoj kun arĝenta tenilo kaj kun samkvalita ingo. Tenante la pomardon sur la polmoj, li dankis al sia dommastro pro belega gastigo kaj diris, ke estos honoro al li se la dommastro kiel simbolon de amikeco akceptus tiun ĉi modestan donacon, kiun li heredis de sia patro.

La dommastro leviĝis, ordigis sian „del-on” kaj korektis la peltan ĉapon. Poste en mallonga sed solena parolado li diris, ke lia bofrato Jisugej kun la filo estis karaj gastoj kaj ĉiam tiaj restos, kiam ajn alvenontaj al tiu ĉi regiono. Li alte taksas la donacon kaj akceptas ĝin kiel garantion por la dumviva reciproka amikeco.

Tiam li etendis ambaŭ brakojn, per profunda riverenco akceptis la ponardon, laŭ la kutima stepa ceremonio.

Dejseĉen deziris eksidi. Sed Jisugej restis starante, montrante per tio la deziron ankoraŭ ion diri, laŭ la sama solena maniero. La dommasro direktis rigardon al lia vizaĝo, kiu ankoraŭ tenis sian solenaspekton kaj mem ekstaris. Tiam la gasto ekparolis:

- Se ni jam tiel firmigis nian ĝisvivan amikecon, mi proponas, ke tion ni certigu ankaŭ per tio, ke vi donos vian filinon Borte por edzino al mia filo Temuĝin. Mi vidis vian filinon, ŝi ekplaĉis al mi, ŝi estas bela kaj vigla, certe ŝi estiĝos bona edzino kaj dommastrino al mia filo. Kaj koncerne Temuĝin, ne estas mia afero laŭdi lin. Vi vidis lin kaj mem decidu, ĉu la ligo estas laŭ via volo.

En la okuloj de dommastro ekflagris fajrero pro kontenteco, kiun li deziris kaŝi. Tamen ĉiuj sciis, ke la gastojn li ĝuste pro tio venigis al sia domo, kaj nun, kiam lia deziro plenumiĝis, ne estas laŭ stepa moro tuj montri la plezuron.

- Verdire, bofilo mia - diris li - via propono ne surprizis min. Niaj infanoj samtempe kreskadis, ili estontus paro, al kiu egala ne estus en nia regiono. Tamen mi ne ŝatus, ke vi decidu abrupte, pro kio vi bedaŭros. Ankaŭ mi ne deziras serĉadi obstaklojn kaj nenie ekzistas. Nu, tiel, ĉar kredeble via filo estos diligenta homo, kun heroa koro, kiel ankaŭ aliaj viroj en via gento, ĉar ankaŭ mia filino estos verŝajne beleta, dommastrino kaj fidela edzino kiel ankaŭ la aliaj virinoj edukataj en nia gento, mi akceptas vian proponon. Estu feliĉaj niaj infanoj!

Li levis ujon de arĥio kaj la alian etendis al Jisugej. Ambaŭ ĝisfunde fortrinkis la enhavon kaj tiel sigelis la kontrakton, kiu verdire estis fianĉiĝo laŭ la stepa maniero.

Dum tuta tiu tempo Temuĝin humile sidis kaj observis ĉion kiel okazantan iel preter li. Neniu lin demandis pri io ajn, eĉ oni forgesis pri lia ĉeesto, same kiel neniu rimarkis, ke la eta Borte foriris helpi al la patrino.

- Kaj se ni jam tiel bone konsentis – diris la dommastro – vi tuj povas lasi vian filon, ke
- li finservu sian fianĉtempon ĉe mi kaj per tio tute meritu sian estontan edzinon.
- Estu tiel bofrato kaj ĵurfrato mia!

La adiaŭaj vortoj estis varmaj kaj la dommastro akompanis la gaston antaŭ la jurton, kie atendis lin jam selita ĉevalo, dum la alian lasis al sia filo Temuĝin.

Li ekrajdis, sponris la ĉevalon kaj jam galopante mansvingis al la jurto, signante adiaŭon.

Inter tiuj, kiuj ĉi tie staris eble li eĉ ne rimarkis sian filon Temuĝinon. Li starante ĉe la pordo de la jurto direktis la rigardon al la rajdanto, sed ne povis vidi lin. Du grandaj larmoj nebuligis liajn okulojn kaj nur laŭ la hufbato de ĉevaloj li certe eksciis, ke li disiĝis de sia patro.

Li sentis, ke tiu disiro ne estis identa al tiu, kiam la patro foriris al kelktaga ĉasado de ĉevaloj. Li havis la senton, ke ĉifoje li por eterne disiĝas de sia patro. Kvazaŭ li estas fortirita de sia familio kaj ankoraŭ ne adoptita al la alia. Tio estis por li tre trista momento.

Kiu scias kiom longe li povintus ankoraŭ stari ĉe la pordo kaj tristi pro la disiĝo, se lin ne vekus ies voĉo:

- Ho, Temuĝin, venu, helpu al mi peli ĉi tiun ĉevalaron al paŝtejo.

Per la manikoj de „del-o” li forviŝis la larmojn, kiuj intertempe ruliĝis de sur lia vizaĝo kaj tiam ekvidis la junulon, kun kiu li interparoladis dum la vespermanĝo kaj ekde la unua momento estis al li simpatia. Li ĵus metadis la selon sur sian ĉevalon kaj ridante per kapo donis signon al Temuĝin.

La knabo aliris sian ĉevalon forprenis la ledajn piedĉenojn, metis la selon sur ĝin kaj enseliĝis. Rektiĝinte li ĉirkaŭen rigardis. Li vidis dekojn de ĉevaloj ĉiuj, unu pli bela ol la alia. Lia koro ekvibris.

- Tio estas la sama kiel hejme – pensis li.

Kiam la amiko ekrajdis post la ĉevaloj, ankaŭ Temuĝin spronis sian ĉevalon kaj galopante sekvis lin al la vasta stepo.

Nun Temuĝin eksentis, ke li estiĝis iu. Li estiĝis io simila al memstara homo, kiu mem respondecas pri siaj agoj. Li eksentis, ke li estas en destinŝanĝo, kvankam ankoraŭ ne estis al li klare, al kia fato lin gvidos la ŝanĝo.

* * *

La monaĥo momente haltigis sian rakonton. Ekiris porti al ni varman salan teon por ke niaj ujoj ne restu malplenaj. Poste foliumis kelkajn paĝojn de „Sekreta Historio de Mongoloj” por ke li rememoru la okazaĵojn, kiuj sekvas.

Subite serĉante inspiron li turnis la rigardon tra la fenestro malproksimen, kie sub la montetoj videblas ruinoj de malnova ĥana ĉefurbo Karakorum. Poste li daŭrigis la rakonton.

- daŭrigo sekvos –

Miŝkolcaj okazintaĵoj

Esploro en la Universitato de Miŝkolco

La Miŝkolca televidilo komencis novan magazinprogramon. La titolo de la sesa televidelsendo estas: Esploro en la Miŝkolca Universitato. La magazino temas pri la en- kaj eksterlandaj esploroj, kunlaboroj, programo de la Universitato. En ĝi ekparolas: la rektoro, vicrektoroj, kaj la estroj de la esplorojn farantaj fakultatoj...”

(MINAP semajngazeto- septembro 2008)

Rakontoj pri reĝo Matiaso

Miŝkolca lernantino gajnis la landan fabeldiran konkurson pri reĝo Matiaso (1443-1490), kiun anoncis la Landa Biblioteko Széchenyi (Budapeŝto) okaze de la 2008-a jaro, kiel jaro de la Renesanco en Hungario.

Viktoría Lengyel prezentis unu fabelon pri reĝo Matiaso, antaŭ ĵurio, konsistanta el etnografiistoj kaj literaturhistoriistoj. La jam plurajn medalojn akirinta lernantino nun akiris novan medalon dum ĉi ranga konkurso, kiu havis plurajn milojn da partoprenantoj...”

(MINAP- N-ro 11.10.2008a)

Jubileo

La 9an de oktobro 2008a festis la Miŝkolca Simfonia Orkestro per grandsukcesa jubilea koncerto sian ekziston de 45 jaroj ... - ni legis en la semajngazeto MINAP- n-ro 11.10.2008a)

Karaj niaj legantoj!

Ni nun rememoras pri tiuj niaj legantoj kaj elstaruloj de nia movado, kiuj mortis ĉi-jare. Ni deziras eternan senĝenan ripozon al ili.

Rememore ankaŭ al doktorino Marianna Legányi, bonvolu akcepti ŝian belan poemon:

D-rino Marianna Legányi

Rusta folio

Sekfolio ĉe l' piedo,

trablovadas ĝin venteto.

Por rimark' ĝi susur-rolas,

je rigard' ĝi ekparolas:

„Jen burĝono primavera,

arbo-panjon ĝi dekoras,

kaj glitante sur la tero
mi memoras, rememoras...
Antaŭ jar' mi ege belis.
Mi ĉielon, teron vidis,
kaj patrin' min utiligis,
tamen por ĉiam perfidis.
Scias mi, ja ne kulpis,
pri mi mia sort' rigoras.
Jen, ĝi estas kruco tia,
ĝis polviĝos korpo mia,
mi memoras, rememoras.

(El la eldonita volumo de Ferenc Jáki/Marianna Legányi: Kantante Vivi - Szolnok 2006
- Tradukis: Tibor Papp)



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>